Francilia federacio
KomitatKunsido (KK) 15/12/2023

Partopreno

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier (PG) vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France ĉeestas
- Marc Giraud (MG) prezidanto ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) vic-sekretario ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison (DL) kasisto malĉeestas
- Kévin Morel-Fourrier (KMF) malĉeestas
- Laure Patas d'Illiers (LPI) sekretario ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) vic-prezidanto ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) senkulpigita

Ekde la antaŭa kunsido

- 22/09 okazis KomitatKunsido, la protokolo estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
- 23/09: malfermataj pordoj, respondecis MG, deĵoris PG, AL. Kontentige okazis, kelkaj kontaktoj kaj lernontoj de MG kaj PG, vizito de Sonia Amariglio, eksprezidantino (vidu https://esperanto.paris/sonia-amariglio).
- 29/09-01/10: Linguafest. Pri nia budo respondecis DL. Deĵoris DL, PG, LPI, FLJ, Elisabeth Barbay, Lucien Bresler, Galex. Senpaga budo, sed la evento estis malprofita por la organizanto (vidu proponon ĉi-suban). Malmultaj vizitantoj pro la enirprezo, sed agrabla etoso.
- 07-22/11: Ĝenerala konferenco de Unesko, el nia federacio pluraj membroj partoprenis (nome de UEA) FLJ, DL, LPI, Briac Millon, nome de ILEI (DJ, kaj du aliaj: Emmanuel Desbrières, Gilles Tabard).
- 15-19/11: Salon de l'éducation. Pri nia budo respondecis FLJ kaj AL. La prezo estis 1 500€ ttc, pagita de Espéranto France. Deĵoris AL, LPI, PG, DL, Lucien Bresler, Saïd Balouchi, Laurent Vignaud, Emile, Martin Sardat, Régis Fournier, Loïc Morvan, Viktoro, Sarah Victor. Multe da vizitantoj, pli ol 1 000 disdonitaj kalendaretoj, la plejparto de la vizitantoj estis junaj, ili malkovris la vorton Esperanto kaj la lingvon. Bona por konigi la lingvon.
- 08/12: tujdissendita vespero en la kanalo Twitch de Océane Amsler. Dankon al LPI, kiu sendis alvokon unu tagon antaŭ la elsendo. Loïc Morvan partoprenis ludon pri lingvoj. Li iomete parolis en Esperanto kaj koncize priskribis la lingvon. 12 300 tujaj spektantoj en Twitch. 300 000 abonantoj. La tutvespera videaĵo baldaŭ libere spekteblos en la Jutuba kanalo de Océane (https://www.youtube.com/watch?v=HHnbZ-1ihAw je 33'33"). La parton pri Esperanto enretigis Viktoro https://www.youtube.com/watch?v=AzhZJMqN688 Bona reklamo pri Esperanto al vastega juna publiko, ekster la celpubliko de niaj kutimaj eventoj.

ZamFesto

La Zamenhof Festo (https://eventaservo.org/e/18abf5) okazos la 16an de decembro de la 2a ptm kaj duono ĝis la 6a ptm, 19 rue Traversière, apud Gare de Lyon. Parto de la programo (poemoj) estos en Esperanto. La festo estas organizita de la fervojistoj. Nia federacio partoprenas: ni donos ĝis 100€, la emblemo kaj nomo de nia asocio videblas sur la afiŝo, ni prizorgos la bufedon. Kutime prizorgas DL, sed ĉifoje li ne disponeblos. Kiu prizorgos (pli bone estu 2 homoj)? LPI, PG

La 17an de decembro, Zamenhof Festo estos organizata far E. Barbay ĉe SAT Amikaro. Partoprenos kelkaj membroj de la nia federacio.

Novjaro

MG kaj LPI sendos mesaĝojn al membroj kaj amikoj por deziri bonan novan jaron, instigi al (re)aliĝo, instigi al kandidatiĝo en la komitaton.

MG kaj LPI sendos bondezirojn al aliaj esperantaj asocioj (Espéranto France, JEFO, fervojistoj, SAT Amikaro, asocio de Romo) kaj al la respondeculo pri asocioj en Paris Centre.

La nunaj komitatanoj devos anonci komence de januaro ĉu ili rekandidatiĝas.

Atentu: necesos trovi novan prezidanton kaj novan sekretarion post la ĜA 2024. Ĉu la vic-uloj MP kaj AK pretas anstataŭi? MP ne. AK ?

Reĝkuko

La dato: sabato la 6an de januaro je la 4a ptm. La buĝeto povus esti proksimume 100€. Kiu aĉetos la reĝkukojn, cidron kaj pomsukon? LPI, AL Dum la evento ni varbos por aliĝi al Espéranto France kaj kandidatiĝi al la komitato.

Vizito

Vizito de Maycon Fernandes (el Brazilo) al Parizo (mardo 2-sab 6 januaro 2024 ptm). Kion ni povus organizi dum lia restado? Li foriros antaŭ la reĝkukofesto. Eventuale eblus mardon (aŭ merkredon?) vespere kune babili kaj kune vespermanĝi en la sidejo,ĉar ne okazos kursoj pro la lernejaj ferioj. AK kontaktos lin, fiksos la daton kaj informos nin, poste ĉiu informos en sian informkanalon;

Kursoj

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG: 7 lernantoj, averaĝe 4
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, MP: 0 lernanto
- cours intermédiaire en ligne, vendredi de 18h00 à 19h30, MG: 8 lernantoj, averaĝe 5
- cours supérieur en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ: 4 lernantoj, averaĝe 3

Neniu el la lastjaraj lernantoj de PG sekvas la ĉi-jaran kurson de MP

Ĉiu instruisto bonvolu registri sian kurson en la retejon Edukado.net[*], la loko estu "Parizo", ne "Paris", kaj en Eventa Servo. PG, MP kaj FLJ faris.

Ĉiu instruisto kreu kaj prizorgu la liston de siaj lernantoj.

Prezoj de la kursoj, por la tuta jaro 2023-2024, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 30€
- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

Ĉiu instruisto devas peti de siaj lernantoj ke ili pagu la kurson, kaj poste la instruisto devas kontroli ke ili tion faras (vi povas demandi al LPI aŭ DL aŭ Said ĉu iu lernanto aliĝis aŭ ne al Espéranto-France).

- surloka kurso: la studento devas pagi al la instruisto la kurson mem, kaj la instruisto devas doni al DL la pagon de la kurso, por la kaso de nia francilia asocio, RAPIDEGE por ke li enkasigu ĝin antaŭ la jarfino. Krome, la studento devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon, ĉu rete https://esperanto-france.org/adherer ĉu (lasante ĉekon) surloke pere de Said.
- reta kurso: la reta kurso mem estas senpaga. La francaj studentoj devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon https://esperanto-france.org/adherer

Kursoj ĉe la pariza grupo de SAT-Amikaro boulevard Vincent Auriol kutime okazas posttagmeze, do ne estas konkurenco kun niaj vesperaj kursoj. Ni informu pri iliaj kursoj kaj petu ke ili informu pri la niaj. LPI prizorgos.

Asekuro de niaj eventoj

Prizorgas DL.

Donacoj

Al nia kasisto DL: kia estas nia financa stato? Ĉu eblas donaci? Kiom? Al kiu? DL proponas ke ni helpu la organizanton de

Linguafest[*] kiu estis malprofita.

Matematika foiro

23-26/05. Ĉu aliĝi? Jes. Kiu prizorgos? FLJ kaj AL. FLJ pagos la budon (100€).

Ŝrankoj

Estas pluraj ŝrankoj en la kursoĉambro. Kiam oni rigardas ene de la kursoĉambro, maldekstre estas ŝranko kun du pordoj, dekstre ŝranko kun unu pordo (ĉe la fenestro). La dekstra ŝranko estas la nia. En la maldekstra parto de la maldekstra ŝranko estis aĵoj de Michèle Abada-Simon kaj de ni (ludoj). Espéranto France forigis ilin. Ili probable estas en la kelo, en skatoloj markitaj per la nomo de Michèle.

AL serĉos niajn ludojn en la skatoloj kun la nomo de Michèle. Li ordigos nian ŝrankon, forigante ĉion, kiu ne estas nun utila, por liberi lokon por meti la retrovitajn ludojn. La arkivoj interesaj povos esti metitaj en la kelo, la reston li forĵetos rubujen. Li algluos etikedon sur la dekstran ŝrankon por sciigi al ĉiuj ke ĝi estas al Espéranto Paris Ile-de-France.

Projektoj

- La junularo kreis instagraman konton (Lulu Tortue): farite, sendependa de nia federacio
- La junularo rekreis unufoje la renkonton en Denfert Café (Briac kaj Loïc), ĝi denove okazos
- Reta prezentado de TEJO al la junularo estas planita (Briac)
- Klubo "Esperanto 94": fermi la asocion, repreni la arĥivojn, glatigi kaj repreni la bankokonton. Sekretario Sylviane Lafargue. FLJ pridiskutos kun ŝi la 16/12. AL studos la urĝecon. DJ sugestas relegi la mesaĝon de Thérésa Sabatier ricevitan la 26an de novembro. Ĉiuokaze, nia federacio ne decidos repreni la monon sen scii kiom restas post pago de la restantaj ŝuldoj.
- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn kaj disdoni librojn: MP ne havas tempon
- Subglasoj: GVN
- Svisa asocio intencas krei paperajn tablotukojn, ĉu ni kuniĝu kun ili (DL)?
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI
- Civitaj servistoj de Espéranto France: EoFr decidis ke ĝiaj civitaj servistoj dediĉos 6 horojn semajne al nia francilia federacio. Dume ili partoprenu kelkajn el niaj eventoj aŭ kursoj.Tial ni devos informi Espéranto France pri tiuj eventoj por ke Espéranto France enigu la eventojn en la laborkalendaron de siaj civitaj servistoj. EoFr ŝajne decidis ne dungi civitajn servistojn ĉi-jare en Parizo.

Respondeculoj pri agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Junulara babilrondo: AL kaj Julien, okazas ĉiumonate kontentige
- Junulara renkontiĝo en Denfert Café: Briac Millon kaj Loïc Morvan, ne regula evento
- Ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN, okazas ĉiumonate kontentige
- Espéranto café croissant: GVN, plu okazas sed ne plu ĉiumonate
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier okazas ĉiumonate
- Prelegturneoj: FLJ, ne okazis, eble denove okazos

Notu bone 1a: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2a: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon mem de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

Respondeculoj pri informkanaloj

La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook MG DL MP https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG (AL) https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo MG DJ FLJ MP https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL
- Propono de AK: aldoni al la listo Vacapan grupon Espéranto Paris-IDF kiu jam ekzistas (AK, Viktoro...): AK respondecos pri republikigo Suivez ce lien pour intégrer mon Groupe WhatsApp / Bv. sekvi jenan ligilon por aliĝi la Vacapan grupon Espéranto-Paris IDF: https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3

GVN ne plu uzas Meet-Up por siaj eventoj kaj pasintan kunvenon DJ anoncis ke Meetup ne plu uzeblas.

Venonta KK

La venonta KK okazos komence de januaro por prepari la ĜAn: la 12an de januaro je 19h30, mikse.

FINO DE LA KK